



UvA-DARE (Digital Academic Repository)

Instrui interlingvistikon universitate

Gobbo, F.

Publication date

2019

Document Version

Final published version

Published in

Esperanto

License

Unspecified

[Link to publication](#)

Citation for published version (APA):

Gobbo, F. (2019). Instrui interlingvistikon universitate. *Esperanto*, 1331, 6-7.

General rights

It is not permitted to download or to forward/distribute the text or part of it without the consent of the author(s) and/or copyright holder(s), other than for strictly personal, individual use, unless the work is under an open content license (like Creative Commons).

Disclaimer/Complaints regulations

If you believe that digital publication of certain material infringes any of your rights or (privacy) interests, please let the Library know, stating your reasons. In case of a legitimate complaint, the Library will make the material inaccessible and/or remove it from the website. Please Ask the Library: <https://uba.uva.nl/en/contact>, or a letter to: Library of the University of Amsterdam, Secretariat, Singel 425, 1012 WP Amsterdam, The Netherlands. You will be contacted as soon as possible.



Instrui interlingvistikon universitate

■ Federico Gobbo

La 3-an de decembro okazis studtago en la Universitato IULM de Milano, sub la titolo “Kia interlingvistiko hodiaŭ?”, kiun mi partoprenis per prelego post invito de Davide Astori, profesoro pri lingvistiko en la Universitato de Parma. Li petis prezenton de mia sperto pri instruado de interlingvistiko sur universitata nivelo. En ĉi tiu artikolo mi resumas la enhavon de tiu prelego, adaptitan al la esperantlingva publiko.

Unue, oni devas noti, ke la altinstruaj institucioj, kiel universitatoj, politeknikoj kaj simile en la mondo estas 28 077, laŭ la kalkulo, kiun publikigis en julio 2018 la Supera Konsilio de Sciencaj Esploroj, hispana institucio, kiu okupiĝas pri interretaj statistikoj kaj aparte pri altinstruado. En Nordameriko tiaj institucioj estas iom malpli ol kvar mil, dum en Eŭropa Unio ili estas pli ol tri mil. Mi havas fidindajn datumojn nur pri tiaj partoj de la mondo, kaj mi scias la kursojn pri interlingvistiko estas entute nur dek du. Malaperas kiel ŝtono en maro! Tiuj ĉi datumoj parte klarigas kial tute ne facilas enkonduki Esperanton aparte kaj interlingvistikon ĝenerale en universitatojn. Multaj kleruloj, kiuj svarmas en universitatoj, tre ofte simple scias nenion pri tiuj ĉi temoj.

En 2008 okazis studtago en la Universitato de Amsterdamo. Ĉeforganizis Wim Jansen, kiu tiutempe regis la Amsterdaman katedron, por diskuti la temon pri instruado de Esperanto en universitatoj. Partoprenis homoj, kiuj gvidis universitatnivelaĵojn kursojn de Esperanto en diversaj partoj de Eŭropo. Mi memoras aparte la rimarkon de Detlev Blanke, laŭ mi la plej grava interlingvisto de la dua duono de la pasinta jarcento. En tiu okazo li substrekis la gravecon pro-

poni Esperanton ne kiel memstaran kurson, sed kiel ĉefan parton de interlingvistiko. Laŭ li nur tiamaniere oni povas atingi firman kaj sufiĉe altan statuson de Esperanto kadre de universitato. Legantoj de la revuo *Esperanto* jam havas informojn pri la rilato inter interlingvistiko kaj Esperanto, danke al la artikolserio “Interlingvistiko por Esperantistoj”, kiu aperis sur ĝiaj paĝoj. Mi do ne profundigos en tiun temon ĉi tie. Tamen, substrekindas, ke almenaŭ laŭ la freŝdata raporto “Universitato kaj Esperanto”, pretigita por ESF en Julio 2018, en multaj universitataj medioj tra la mondo, kie Esperanto iel aperas, la rilato kun interlingvistiko aŭ ne estas klara, aŭ eĉ tute ne ekzistas. Alivorte, la vortoj de Detlev Blanke ne estis propre aŭskultitaj de multaj. Permesu al mi klarigi kial tiu rimarko tiel gravas.

Mia sperto instrui interlingvistikon komenciĝis ĝuste en 2008, kaj pro tio mi flugis tiam al Amsterdamo. Fakte, tiam mi estis gvidanta laboratorion en la Universitato de Milano laŭ invito de Paolo Valore, esploristo pri filozofio, dum unu jaro. En la itala situacio, la plej grava altlerniga institucio en Italio en kiu interlingvistiko kaj Esperanto ludas rolon, ne troviĝas en Milano, sed en Torino. Fakte, mia plej longa sperto ĝis nun estas ĝuste en la Universitato de Torino, kiel posteulo de Fabrizio Pennacchietti, emerita profesoro ne nur pri interlingvistiko kaj esperantologio, sed ankaŭ (kaj ĉefe, ni agnosku tion) pri semida filologio. En la jaro 1998 mi defendis mian magistran tezon pri socilingvistiko de Esperanto – kiu interalie gajnis la Premion Lapenna – kaj la referanto estis profesoro Pennacchietti. Post lia emeritiĝo malfermiĝis laŭkontrakta posteno, sponsorigita de la Itala Instituto de Esperan-

to, kontraŭ malgranda stipendio. La kontrakton oni devas renovigi ĉiun universitatan jaron. Gravus substreki la fakton, ke por malfermi tian kontrakton, oni devis enkadrigi ne nur Esperanton sed ankaŭ interlingvistikon kiel subfakojn de lingvoplanado, kaj tiel sukcese gajni la atenton de la Torinaj socilingvistoj. Ekde 2011 ĉiujare la gajninto de tiu posteno estis mi. Ankaŭ danke al la Torina sperto, en 2013 mi povis konvinki la kuratoriaron de la speciala katedro de la Universitato de Amsterdamo, ke mi estas taŭga homo por katedruliĝi pro simila sperto. Fakte, en tiu jaro Wim Jansen emeritiĝis kaj oni bezonis trovi posteulon. Mi gajnis la postenon, kaj do, ekde 2014 mi regule instruas interlingvistikon kaj Esperanton tie, en du apartaj kursoj, kaj samtempe esploras pri ambaŭ temoj. Notindas, ke la speciala katedro en Amsterdamo estas unikaĵo, ĉar ĝi estas la sola en la tuta mondo kiu garantias la titolon de ordinara profesoro esplicite pro Esperanto.

En la sinsekvo de ĉi tiu artikolo, mi volas klarigi la gravecon de interlingvistiko por enkonduki Esperanton universitate kaj espereble helpi al la starigo de situacioj similaj al la Amsterdama kaj al la Torina en aliaj partoj de la mondo. Unue, oni notu, ke la sciencfaka pozicio de interlingvistiko ne estas fiksa, sed ŝanĝiĝas tra la jaroj, laŭ la epokoj. Antaŭ la Dua mondmilito, oni parolis ĉefe pri internaciaj helplingvoj, kaj komparis lingvoprojektojn alternativajn al Esperanto, sen ajna rigardo al la socilingvistika fakto, ke Esperanto sukcesis formi stabilan komunumon – aŭ, pli precize, kolektivon – disan tra la mondo, male al la aliaj. Post la Dua mondmilito, la komparo kun la rivaloj preskaŭ malaperis en la fakliteraturo, kaj

Rosalba Galati, Torina studentino pri Esperanto, ricevas diplomon pri Esperanto Masterclass en la Universitato de Liverpoolo en 2014 (2014; fotis Peeter Aitai)



interlingvistiko okupiĝis ĉefe pri komparo de Esperanto kun aliaj solvoj de la internacia komunikado, aparte kun la internacia uzo de la angla.

Sed la situacio draste ŝanĝiĝis ekde la bitepoko, tio estas kiam estis inventita la Tut-Tera Teksaĵo, en la fruaj 1990-aj jaroj. La videbleco de la tiel nomataj lingvoj de malplejmultoj – ekzemple indiĝenaj, minoritataj, minorigitaj, aŭ kontestataj, kiel la signolingvoj – trovis novan scenejon, kiu pli kaj pli grandiĝis paralele al la kresko de la uzantoj de interreto. Esperanto, sed ne nur, profitis de tiu situacio. Novaj planlingvaj projektoj aperis. Kelkaj el ili ne estis destinitaj al internacia komunikado, sed al artaj, beletraj aŭ fikciaj uzoj. Oni bezonis atendi kelkajn jarojn antaŭ ol disvastiĝis la Tut-Tera Teksaĵo dise tra la mondo.

En la ĉi-jarcenta interlingvistiko gravas la jaro 2009. En tiu jaro, sur la modelo de la klingona, la lingvo de la alimondanoj en la fikcia universo de *Star Trek*, publikiĝis la dotraka kaj la navia. La dotraka venas de la fikcia mondo de la populara televidserio *La Ludo de la Tronoj*, kaj en tiu fikcia mondo apartenas al homa popolo, nomada, kies kulturo baziĝas sur la ĉevalo. Male

la navia, kiu aperis kadre de la filmo *Avataro* de la usona reĝisoro James Cameron, apartenas al bluhaŭtaj alimondanoj, kiuj loĝas harmonie kun la naturo de la luno Pandoro. Oni ne devas subtaksi tiun novan branĉon de interlingvistiko, kiun mi ŝatas nomi "Holivuda lingvistiko". Multaj problemoj kaj solvoj de la klasikaj planlingvoj – kiel Volapuko aŭ Esperanto – trovas alian kamplaboron en la kazo de Holivudaj lingvoj kiel la klingona, dotraka aŭ navia. Krome, mi konstatis, ke en la 2010-aj jaroj, la plejmulto de miaj studentoj – aparte en Amsterdamo – ekinteresiĝas pri interlingvistiko pro Holivuda lingvistiko, ne pro Esperanto (aŭ Volapuko). Menciindas, ke kelkfoje ili venas pro la fikciaj lingvoj de Tolkien, la fama oksforda filologo kaj verkisto, pri kio mi mallonge parolas.

Poste, kiam la studentoj eksekvas la kurson, ili malkovras, ke Esperanto estas tre interesa fenomeno, multe pli bunta ol tiu de la Holivudaj lingvoj. Sed, se mi ne parolus pri Holivudo en miaj klasoj, mi havus nur trionon de la studentoj enklase, kaj la nombro de la studentoj gravas por nedevigaj kursoj. Gravas, ke oni ne konsideru

Holivudan lingvistikon nur kiel fiŝkaptilon de studentoj, por tiel diri. Fakte, ankaŭ esplorvidpunkte lingvoj kiel la klingona aŭ la dotraka estas interesaj, ĉar ili havas siajn rondojn da fanoj. Danke al tio, Esperanton oni povas kompari ne nur kun etnolingvoj internacie uzataj aŭ kun lingvoj de malplejmultoj sed ankaŭ kun aliaj planlingvoj, kiuj esplicite ne konkurencas kun ĝi. Alia stranga sed interesa kazo estas Tokipono, kiu iel popularas ankaŭ inter esperantistoj. Ju pli oni povas starigi esplorajn kaj instruajn ligojn kun aliaj partoj de lingvistiko – aŭ de historio kaj kulturo ĝenerale – des pli la intereso al Esperanto altiĝas ne nur inter studentoj, sed ankaŭ inter kolegoj. Nur tiel la ŝancoj starigi firman kurson en universitato realismas. Konklude: ni fosu nian sulkon, sed samtempe ni ne forgesu montri nian sulkon al niaj najbaroj.

Al justa lingvopolitiko en Azio / Towards Equitable Language Policy in Asia / Azia ni okeru kouseina gengoseisaku ni mukete. Aktoj de la 5-a Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj, Tokio, 2007. Red. Goro Christoph Kimura kaj Naoko Yoshida. Tokio: European Institute, Sophia University / JEI, 2008. 219p. 26cm. Trilingva: Esperanto, angla, japana. € 7,50



Al nova internacia lingva ordo / Towards a New International Language Order / Maixiang guoji yuyan xin zhixu. Aktoj de la 3-a Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj, Pekino, 25-26 VII 2004. Red. Lee Chong-Yeong kaj Liu Haitao. Rotterdam, UEA, 2004. 239p. 24cm. Trilingva: Esperanto, angla, ĉina. € 7,50

Al lingva demokratio / Towards Linguistic Democracy / Vers la démocratie linguistique. Aktoj de la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj, Prago, 20-23 VII 1996. Red. Mark Fettes kaj Suzanne Bolduc. Rotterdam, UEA, 1998. 212p. 24cm. Trilingva: Esperanto, angla, franca. € 7,50

